

## AVENO #43 - Homaj Rajtoj - 2017

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, ... sh + u. Ligoj:

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: [www.linguistic-rights.org/](http://www.linguistic-rights.org/)

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

--

Eble vi rememoras la belan kaj valoran afishon kun titolo „PACO“ en pli ol 100 lingvoj ?

Ghi estas mendebla kaj rigardebla che la UEA-libroservo.

Paco – ne estas nur la kontrauo de milito – ne nur la periodo inter du militoj.

Paco estas multe pli. Paco estas la legho de la homa vivo.

Paco estas tiam, kiam ni agas juste kaj kiam inter chiuj unuopaj homoj kaj chiuj popoloj regas justeco.

---

2017-11-24 Katalunio volas diskuti kun Hispanio

en intervjuo klare rakontis Carles Puigdemont, la prezidento de la autonoma provinco Katalunio, kial li trovighas en Belgio, kaj kion li kaj liaj samideanoj celas. Li iris al Belgio ĉar en Hispanio ne eblas defendi sian aferon laŭ la Homaj Rajtoj. Kaj li denove postulas diskutadon pri vera autonomio (simile al Euska Lando) kun la celo plibonigi la rilatojn kaj situacion inter Katalunio kaj la nacia ŝtato. Li atendas la elekton en Decembro, kaj esperas ke denove majoritato denove voĉdonos favore al tiuj postuloj. Kaj tiam la hispana prezidento devus movighi al Ronda Tablo, kaj liberigi la malliberigitajn politikistojn kaj prezidantojn (la 2 Jordi) de katalunaj CSO-oj (CSO = Civil-Sociaj Organizoj ).

Jen audeblas la intervjuo en la germana kaj la hispana lingvoj:

[www.deutschlandfunk.de/carles-puigdemont-natuerlich-betrachte-ich-mich-noch-als.694.de.html](http://www.deutschlandfunk.de/carles-puigdemont-natuerlich-betrachte-ich-mich-noch-als.694.de.html)

*Komento AVE/mw:* vere necesus, ke EU subtenos tian serĉon por harmonio.

Momente mi ne sukcesis al la hispana – eble pro mia komputilo.

---

2017-11 Paco-homoj tutmonde

Mi tro ofte raportas pri malagrablaĵoj aŭ petas subskribi kontraŭ iu ajna fi-ajho. Chi-foje temas pri ekzemplodonaj homoj:

Therese Mema Mapenzi (D.R. Kongo):

pro ŝia agado favore al virinoj kiuj suferis seks-perforton, kaj en „chambro por auskulti“ ili povas rakonti la ne-rakonteblan, kaj tiamaniere re-sanghi psike. La plej kruela seksperforto estas milita metodo detrui la moralon de la kontraŭulo. Mapenzi ricevis la premion „Shalom“ de germana katolika universitato Eichstätt - [www.ak-shalom.com](http://www.ak-shalom.com)

---

Mazen Faraj kaj Robi Damelin (Palestino & Israelo):

La filo de Robi estis mortpafita de palestino; la patro de Mazen estis mortpafita de israelaj soldatoj.

Nun ili laboras kune por „Parents Circle“ - de familioj kiuj perdis familianojn en tiu konflikto. Tiu asocio ankaŭ ricevis kelkajn premiojn; subtenas la familiojn kaj postulas finon de la subpremo flanke de Israelo – kaj finfine justan pacon.

--

Miodrag Tasic kaj Ivica ... (Serbio & Kroatio):

Ili estis batalantoj dum la serba-kroata milito 1990. Nun ili kunlaboras por diskuti la okazintaĵojn kaj antaŭenirigi pacan kunlaboron.

--

Tsering Woesser (Tibeto, P.R.Chinio):

Shi ne rajtas forlasi Pekinon, kie ŝi vivas kun ŝia edzo. Ŝi subtenas la Homajn Rajtojn de la tibeta popolo, respektive li por la uĝuroj. Ŝi spertis la teroron de la t.n. „Kultura Revolucio“.

Pli pri disidentoj (mal-sam-opini-uloj) en P.R.Chinio: [en.wikipedia.org/wiki/List\\_of\\_Chinese\\_dissidents](http://en.wikipedia.org/wiki/List_of_Chinese_dissidents)

kaj pli pri Tibeto: [www.tibet-initiative.de/](http://www.tibet-initiative.de/)

en la angla: [www.tibet-initiative.de/english/](http://www.tibet-initiative.de/english/)

--

Hildegard Goss-Mayr & Jean Goss (Austrio):

pli-evoluis la sen-perfortan metodon solvi intertnajn kaj aliajn konfliktojn.

Shi estas honora prezidantino de IFOR (Internacia Kunularo por Repacigho):  
Pliaj detaloj en Esperanto: [eo.wikipedia.org/wiki/IFOR](http://eo.wikipedia.org/wiki/IFOR)

(tiuj informoj unue el Publik Forum – Dosiero „Krieg ist keine Lösung“ - t.e. Milito ne estas solvo

---

2017-09-30 Eliroj: Grand-Britio, Katalunio, Kurdistano, Rakhinio

kvar diversaj situacioj, sed komuna trajto, ke oni ne plu volas kunvivi en la sama shtato. Mi uzis [wikipedio.org](http://wikipedio.org) kaj diversajn amas-mediojn:

Grand-Britio: oni decidis per minimuma plimulto la Brexit, kaj nun komencighas la longdauraj interparoloj pri pacema eliro. Ankoraŭ restas multaj demandoj pri reguloj kaj financoj.

Komento (mw): chu eblas transdoni Nord-Irlandon al Irlando, do al la EU, kontraŭ iom granda monsumo (de EU); necesus rajtigi la koncernitajn loĝantojn translokiĝi al kaj de la brita insulo.

Katalunio: la kataluna popolo estis traktita ne sufiĉe agrable de la majoritata hispana registaro. Temis ĉefe pri la lingvo kaj pri mono. Sed anstataŭ kunsidi je ronda tablo kaj interparoli, la shtata registaro apogas sin al la leĝo. Leĝoj ne ĉiam estas justaj; krome ili estas ŝanĝeblaj. Tiu stulteca konduto pliakraigas la situacion, kaj plimultigas la jes-decidontojn morgaŭ. Mi esperas ke dum la voĉdonado neniu mortos. Sed: ke poste la registaro pripensos kiel kunvivi – eĉ en estonta najbareco.

Suda Kurdistano: dum la lastaj jaroj la kurdoj forte subtenis la liberigon en sia regiono kaj en najbara Sirio de la islamistaj teroristoj. Kiam oni dividis Antaŭ-azion oni forĝis doni teritorion al la kurdoj. Nun venis la tempo re-ordigi la aferon. Ĉar ankaŭ en najbaraj regionoj de Turkio kaj Irano loĝas kurdoj, tiuj shtatoj timas, ke iam ankaŭ iliaj kurdoj preferas unuigi kun Kurdistano. La iraka registaro malpermesis la referendumon, kiu tamen atingis grandegan plimulton. Nun necesus diskuti pri la kielo.

Rakinio / Arakan en Birmo (oficiale Mjanmao): Bedaurinde akriĝis la reciproka malŝato inter la budhismaj loĝantoj en Birmo kaj la islamaj en Rakhinio. Mi rezignas raporti detale pri la antaŭa historio, sed necesus konsideri ĝin. Ek de 1945 okazis ĉ. 20 atakoj/militoj de la shtato kontraŭ la rohingja. Kaj 1982 la registaro neis la civitanecon de tiu islama populacio.

2013 oni malpermesis al la rohingja havi pli ol 2 infanojn, preni budhisman edzinon (kiu ja devus konverti al islamo), kaj la poligamion.

Post atako de polica oficejo je la 25-a de Augusto 2017 flanke de iuj rohingjanoj (ARSA) la registaro klopodis forpeli tiun populacion al eksterlando; fuĝis ĉ. 480.000; bedaurinde la soldatoj ankaŭ mortigis multajn (pli ol 1000). Ĉar la najbara islama Bangladeŝ jam estas tro-loĝhata, ili enlasis nur parton de la fuĝintoj.

Intertempe la registaro eniron de UN-kontrolisto, tamen ankoraŭ mankas detala neutrala informo.

Bedaurinde la Nobel-premiita prezidentino Aung San Su Ki nur post longa tempo parolis oficiale, kritikis la perfortojn; sed oni ne scias, ĉu ŝia parolo vere helpos.

Komento (mw): Birmo havas mezan populacio-densecon, do la kvanto da homoj ne tiom gravas. Mi supozas, ke oni volas protekti la budhisman religion kontraŭ la islamo. En la historio la budhismo estis forpelita de la islamaj konkerantoj; kaj se islama populacio pli rapide kreskas oni same timas marghenighon. Dalai Lamao diris, ke budho ne reagus tiel kruele – mi ne scias, ĉu li ankaŭ proponis pli agrablan solvon.

---

2017-09-27 Rusio detruis siajn kemiajn armilojn

1997 la mondo decidis aboli kemiajn armilojn; oni fondis OPCW. Bedaurinde eĉ nun ili estas kruele uzataj en Sirio, Ĉan Ŝajĉun, kie mortis 70 homoj en Aprilo 2017.

Ek de 2002 Rusio detruis sian stokon (iam 40 mil tunoj) en sep uzinoj, kies investo (entute 4,6 miliardoj EUR) estis subtenata de la aliaj G7/G8 landoj, ekz-e Germanio alpagis 367 milionoj.

Nun la resto de la stoko estis detruita en Kishner, Udmurtio.

(informo Badische Zeitung, 2017-09-28, p.7)

Same ekzistas traktato pri abolo de biologiaj armiloj – BTWC

sed tie mankas kontrol-sistemo.

Bedaurinde kelkaj shtatoj ne subskribis tiajn traktatojn.

(informoj: [eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org))

---

2017-07-07 Pakto pri abolo de nukleaj armiloj

Lastfoje mi informis pri tiu pakto, sed forgesiis mencii ke la tradukisoj estis Colette kaj Andre Weiss (enkadre de E-D-E).

La Esperanto-versio de tiu dokumento troviĝas sur nia retejo : [verduloj.org](http://verduloj.org) .

---

2017-09-23 Alvoko al Donald J. Trump kaj Kim Jong-Un

Karaj Prezidentoj,

La rilatoj inter viaj du landoj estas tre streĉitaj, pro norda-koreiaj nukleaj provoj kaj usonaj minacoj.

Viaj eldiroj kaj planoj estas katastrofaj, kaj ne helpas solvi ĉi-tiun krizon.

Karaj prezidentoj, oni ne povas respondi al perforto per perforto.

Martin Luther King lasis al ni gravajn lecionojn pri la neperforto.

Kial vi volas uzi armilojn ?

Kial pro nur unu persono, vi volas mortigi tutan popolon ?

Ĉu vi pretas detrui nian mondon kaj naturon ?

Evidente vi, usona prezidento, nenion lernis el la kaosoj kiun vi (kaj viaj antaŭuloj) semis en Irako,

Afganlando, Sirio, Libio, en D.R. Kongo (mia lando), kaj aliloke ?

Kion vi gajnis en la landoj kie vi kreis militojn ?

Bonvolu uzi la monon, kiun vi volas investi en nukleaj bomboj, por konstrui lernejojn, orfejojn, firmaojn, la sanigejojn, ...

anstataŭ fabriki armilojn kiuj timigas la mondon kaj pelas homojn amase fughi de sia lando. Investu tiun monon por tutmonda harmonia kaj esperplena vivo.

Ni, esperantistoj, ni kontraŭas armilojn kaj anstataŭ vokas vin ambau al dialogo por ke vi trovu pacajn solvojn. **Bonvolu vi ambau subskribi kaj respekti la aktualan traktaton por aboli nukleajn armilojn !**

Karaj prezidentoj, mi pretiĝas por esti mediato de tiu krizo ĉar la milito ne estas bona.

Kun espero kaj ghojo, bondezirojn,

Fadhili Enzo Martin, Uvira, D.R.Kongo

---

2017-07-07 Pakto pri abolo de nukleaj armiloj

Tiu ĉi somero estas la unua, memorinda somero post kiam la pakto pri abolo de nukleaj armiloj estis adoptita de 122 landoj la 7an de julio 2017 en la Unuiĝintaj Nacioj. La oficiala nomo de tiu ĉi pakto estas "Pakto pri malpermeso de ekspluatado, testado, produktado, stokado, transdono, uzo kaj minaco per uzo de nukleaj armiloj kaj ĝia abolo" (angle: Convention on the Prohibition of the Development, Testing, Production, Stockpiling, Transfer, Use and Threat of Use of Nuclear Weapons and on their Elimination). Kiam 50 landoj subskribos ĝin, ĝi ekvalidos post 90 tagoj.

Bedaurinde nek Japanio nek Germanio volas subskribi ĝin, ĉar mankas sistemo en la pakto kiel pravi la malarmadon.

La Esperanto-versio de tiu dokumento troviĝas sur nia retejo : [verduloj.org](http://verduloj.org) .

La tradukistoj estis Colette kaj Andre Weiss (enkadre de E-D-E).

[Www.de.wikipedia.org/wiki/Atomwaffenverbotsvertrag](http://Www.de.wikipedia.org/wiki/Atomwaffenverbotsvertrag) (lau informo de HORI Jasuo)

---

2017-09-12 Bona sukceso por opozicio en Moskvo

Malforta partopreno (15%) montris la ĝeneralan malfavoran agnoskon de tiu komunuma baloto. Pozitive, 67 elektitoj venas la la opozicio. (lau [openrussia.org](http://openrussia.org))

---

2017-07-13 Tendenco al diktaturaj reĝimoj en Turkio, Pollando, Ĉinio k.a.

Grava diferenco inter demokratio kaj diktaturo estas la dividitaj povoj, t.s. sendependa justeco, leghfarado de libere elektita parlamento, kaj regado; adicie gravas sendependa ĵurnalismo kaj civitanaj asocioj. Tio mankas en multaj landoj, bedaurinde la tendenco marshas al diktaturaj sistemoj, kie tiuj principoj ne validas.

Turkio: La registaro en Turkio malebligas la esploron de la lastjara „puĉo“ - sed daŭre enkarcerigas engaghitajn homojn (ĵurnalistojn, AI-aktivulojn, parlamentanojn, k.a.) kaj maldungas homojn asertante ke ili estas agentoj de la Gülen-Movado.

Pollando:

la reganta partio PIS aktivis mal-sendependigi la justecon, tio estus plia pasho cele al diktaturo. Multaj civitanoj protestas, sed la registaro ankoraŭ uzas siajn eblecojn. EU nun diskutas bari la voĉon de Pollando.

P.R.Chinio:

Hongkong ankoraŭ havas pli liberan statuson, sed Pekino pli kaj pli enrudighas.

Interese estas ke literaturo gvidas rolon. La ursoj gvidas interesan rolon; sed Xi malshatas „Pu“, kiu estas simbolo de mem-pensado.

Elstare estas la morto de Liu Xiao Bo, nobelpremiito pri literaturo, kiu estis malliberigita 2009-12 pro sia opini-esprimo (enkadre de civitan-rajteca Charto 08), kaj en la malliberejo malsanighis je hepata kancero, kaj nur ĵus antaŭ sia morto estis el-lasita; sed ne rajtis trovi kuracistan helpon en eksterlando. Li mortis 2017-07-13. Legu ankaŭ pri li en [eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org) kaj en aliaj lingvoj.

Indas ankaŭ rememori al la subpremo de libera religio-aktivado de budhistoj en la Tibeta Autonomio kaj ankaŭ de kristanoj – ili ja rajtas aktivi, sed nur en la kadro de la ŝtata ideo – kontraste al la Homaj Rajtoj.

Usono:

la nova prezidento klopodas redukti la sendependecon de la povoj, pepas mensogajn informojn, sed la civitana forto estas ankoraŭ sufiĉe bonkvalita, ke Trump ne povas fari kion ajn li volas.

Rusio:

civitanoj en pluraj urboj manifestaciis kontraŭ korupcio de politikaj moshtoj.

Dume en Nederlando daŭras la klopodoj trovi la fin-respondeculon (supozeble en Rusio) kiu ebligis la pafon de la persona aviadilo MH17, kiam mortis 298 homoj; detalojn:

[https://de.wikipedia.org/wiki/Malaysia-Airlines-Flug\\_17](https://de.wikipedia.org/wiki/Malaysia-Airlines-Flug_17)

Pluraj aliaj ŝtatoj:

(mi invitas vin sendi koncizajn artikolojn – prefere kun fonto-indiko)

(fontoj: , [wikipedia.org](http://wikipedia.org), [ard.de](http://ard.de) - serĉu la nomon de la lando en la germana)

---

2017-05-22 Krim-tataroj ne sentas sin hejmece – Homaj Rajtoj mankas

Rebecca Harms raportis pri intervjuo en Kievo pri la Homaj Rajtoj de tataroj sur Krimeo.

Lau la retejo de CSO (lingvoj: en, ru, uk) [krymsos.com/en/](http://krymsos.com/en/) la tataroj estas subpremataj, ne rajtas publike praktiki sian islaman religion kaj sian tataran lingvon. Ili ne plu rajtas mem-administri sin, kiel estis antaŭe.

Ukrainoj kiuj protestas kontraŭ la anekso de Krimeo flanke de Rusio (jes, mi scias ke oni faris „referendumon“ - sed ne sub liberaj cirkonstancoj – bonvolu legi pri tio la libron pri Krimeo de Kalle Kniivilä). Junulo Ruslan Zeitullayev jam la duan fojon ne mangas (malsat-strikas).

(lau Rebecca Harms, MEP Verduloj)

---

2017-03-27 Tutlanda Rusia Junularo kontraŭ-korupto

vi certe legis pri la multaj manifestacioj de junuloj inter Piter kaj W-Wostok.

Kiuj vidis la filmeton (de Navalny) pri la kolekto da konstruajhoj flanke de la prezidento.

Ili petas informon pri (kaj finon de ) la sin-richigho, aparte de la ankoraŭ-a prezidento Medvedev .

La rusa juro-kortumo ne serĉas pri la vero, sed la polico arestas la demandintojn.

Ekzemple en Moskvo oni ja ne malpermesis la manifestaciojn, kondiĉe ke ili okazu for de la centro ...

Sed tio ne decas se temas pri tia problemo.

Jes, korupto estas en la homa psikologio, kaj supozeble en ĉiu lando okazas diversgrade korupto.

Kutime ekzistas limoj, sub kio bonintencaj donacoj ne estas nomitaj korupto - en Germanio ĉiukaze sub 50 Euroj. En funkcia demokratia ŝtato ekzistas sendependa amas-medioj kaj jurokortumoj, kiuj sekvas la informojn pri korupto kaj zorgas fini ĝin kaj puni - laŭgrade - la koruptulojn.

Jen la tro konciza informo pri la mezurita tutmonda korupteco - de tie vo povas atingi la informojn en via lingvo. Espereble pli detala.

[www.eo.wikipedia.org/wiki/Indico\\_de\\_perceptata\\_korupto](http://www.eo.wikipedia.org/wiki/Indico_de_perceptata_korupto)

---

2017-03 **Demokratio – sendependaj kontroloj** - ĉu ne plu bezonataj ?

La registaro de Pollando malbonighis la laboron de la konstitucia jughkortumo, krome (kiel sola lando) ne

konsentas la denovan elekton de Donald Tusk (PL) igi prezidento de la konsilio de EU-Ministroj. Erdogan, prezidento de Turkio, uzas la t.n. puchon maldungis milojn da progresivaj oficistoj, jhurnalistoj kaj profesoroj; nun foriras el la demokratia sistemo; sia lando glitas en ekonomian krizon. Jen la demokratio-indekso: [eo.wikipedia.org/wiki/Demokratieca\\_indekso](http://eo.wikipedia.org/wiki/Demokratieca_indekso)  
Leginda libro en Esperanto - de UEA-libroservo: Kio estas Demokratio

---

### **1959-03-10 Popola ribelo en Tibeto – ankorau sen autonomio**

La 10-a de marto estas la tago montri la flagon de Tibeto, por rememori la ribelon. Dum la kontrau-batalo 89.000 tibetanoj estis mortigitaj. Bedaurinde al tiu giganta Autonoma Regiono mankas kultura autonomio. La registaro permesas budhismon se ghi utilas al turismo; sed detruas la originan budhisman kulturon (ekz-e de la instrua monahhejo Larung Gar, kies 5.000 ge-monahhoj estas forpelataj, kaj la loghejoj detruataj). Pli (en la angla, china, germana): [tibet-initiative.de](http://tibet-initiative.de)  
Kelkaj artikoloj de AVE: [verduloj.org/tibet.htm](http://verduloj.org/tibet.htm) – kaj je la ligoj tie.

---

### **2017-02-19 Tibeto kaj Orienta Turkestanto (XinJiang) pleje mankas libereco**

[https://freedomhouse.org/sites/default/files/FH\\_FIW\\_2017\\_Report\\_Final.pdf](https://freedomhouse.org/sites/default/files/FH_FIW_2017_Report_Final.pdf)  
Zu Tibet und Xinjiang - einem weiteren Territorium unter chinesischer Herrschaft - steht in dem Bericht: „Die chinesische Regierung verhängt in den von Tibetern und Uighuren bewohnten Regionen des Landes weiterhin kriegsrechtsähnliche Maßnahmen und weigert sich, ihre gescheiterte Politik der Repression bei diesen ethnischen Minderheiten neu zu bewerten“.

---

### **2017-02-07 BREXIT ktp ne por Skotlando ktp.**

Intertempe la britia suba parlamento akceptis la legh-proponon de la registaro eliri el EU. Malgrau tio, ke la popolo voĉdonis nur ch. 52:48 por Brexit (bedaurinde multaj junuloj forgesis iri al la voĉdono, kaj poste grumblis pri tio ), plejmulto de la parlamentanoj sekvis la ordonojn de siaj chefoj kaj akceptis ch. (300:150). Tamen ech pluraj Labour-anoj mal-akceptis la proponon. Britio konsistas el Anglio, Valizio, Skotlando kaj Norda Irlando. Se vere Britio kaj EU findiskutos (ene de ch. 2 jaroj) la Brexit, okazos du strangaj situacioj: Norda Irlando havus land-limon al la EU-lando Irlando. Skotlando malakceptas la Brexit, kaj preferus eliri el Britio; simile Katalunio el Hispanio. En Skotlando estas la jena statistiko: 62% volas resti ene de EU; 58 (de la 59) parlamentanoj voĉdonis kontrau Brexit; Chiuj 32 konsiliaj distriktoj voĉdonis resti ene de EU La Skotlanda Parlamento diskutis pri tiu Artikolo 50 (de la EU-“konstitucio“). Majoritato de skotlandaj MSP-oj (?) kontrauas al Brexit. La nombroj lau informo de la Verda Partio de Skotlando: [campaigns@scottishgreens.org.uk](mailto:campaigns@scottishgreens.org.uk)

---

### **2017-01-30 Hispanio klopodas kateni Katalunio**

Katalunio estas aŭtonoma komunumo en Hispanio. En julio 2010, la hispana Konstitucia Tribunalo, post kvar jaroj da studado, 'masakris' la novan statuson de Katalunio aprobita de la hispana parlamento kaj referendumo de la kataluna popolo. Tia ago, taksita de kelkaj fakuloj kiel 'puĉo', instigis la deziron sendependiĝi de la kataluna popolo, ĝis tiam minoritata sento. La hispana registaro neniel kaj neniam provis trovi politikajn solvojn. Kontraŭe, ili nur postuladas respekton al la leĝo, leĝo kiun en la praktiko ili ĉiam tordas laŭ propra konveno. Fine, la konflikto ne temas pri sendependiĝo aŭ ne, sed temas pri la rajto debati en la parlamento kaj en la magistratoj pri temo kiu interesas al granda parto de la kataluna popolo (80% laŭ enketoj). Pro tia malpermeso debati pri sendependiĝo aŭ ne, oni komencis kriminalajn procedurojn (pli-malpli avancintajn) kontraŭ la antaŭa ĉefministro kaj tri el liaj ministroj, kontraŭ la nuna prezidanto de la kataluna parlamento kaj kontraŭ urbestroj kaj magistratoj de 400 urboj (el iom pli ol 900 en tuta Katalunio)." (informo de Ramon)

Kaj jen artikolo de New York Times (en la angla):

[www.nytimes.com/2017/01/30/opinion/defending-freedom-in-catalonia.html?\\_r=2](http://www.nytimes.com/2017/01/30/opinion/defending-freedom-in-catalonia.html?_r=2)